

KOVERTO RAKONTAS...

Elda DOERFLER

Mi longatempe kuŝis en la skribotabla tirkesto de la franca esperantisto-sekretario Pierre Petit, ĝis kiam oni ekuzis min por propagandi grandiozan eventon.


Sur ĝi legeblas la nomo kaj adreso de la sendinto: **Société Française pour la Propagation de l'Esperanto** (Societo Franca por la Disvastigo de Esperanto). Aŭtoritata organizacio, fondita jam en 1898 de la bone konata Louis de Beaufront: tiam en ĝia nomo malestis la vorto *Française*, pli poste aldonita en 1903.

Sed *mi* daŭrigu la rakonton. La stampo diras, ke *mi* vojaĝis en 1937, pli precize la 17^{an} de majo. En tiu jaro prezidanto de la Franca societo estis la famega esperantisto Ernest Archdeacon. Advokato, li en

sia tuta vivo multe interesiĝis pri sciencoj kaj arde pasiĝis je la plej modernaj veturiloj: sfera balono, aŭtomobiloj kaj fine flugaparatoj. Ĉi-flanke videblas lia karikaturo, kiu evidentiĝas lian grandan amon al flugado: tiu poŝtkarto estis eldonita en 1913 de Alice Farges, Esperanto-Oficejo Lyon. Li estis serioza kaj konstanta propagandisto de kaj grandanima mecenato favore al la internacia lingvo, de li eklernita en 1908.

Al la Internacia Konferenco "*Esperanto en la moderna vivo*", organizita

enkadre de la Internacia Ekspozicio de Artoj kaj Teknikoj en la moderna vivo, Parizo, rilatas la stampo kiu funkciis okaze de tiu evento ĝis la fino de novembro 1937. La esperanta konferenco daŭris de



la 14^a ĝis la 17^a de majo. Ĝi estis tre grava okazaĵo, kiun, sukcese kaj brile, organizis la parizaj kaj francaj esperantistoj.

Ĝiaj temoj estis dividitaj en 4 sekciojn:

1. *Esperanto en lernejo*;
2. *Sciencoj puraj kaj aplikataj*;
3. *Internacia trafiko*;
4. *Intelektaj interŝanĝoj*.

Al la Internacia konferenco aliĝis pli ol 400 personoj el 30 diversaj landoj. La aranĝo vidis la ĉeeston de la plej altrangaj politikistoj, universitataj profesoroj, gravaj instancoj plus pluraj asocioj. El tiuj menciendas nur kelkaj, ĉar la listo estas tro longa: s-ro Jullien - franca vicministro pri Teknika Instruado; Kapitano de Fregato Krantz, S-ro Lebrun, reprezentanto de la franca Respubliko; S-ro Vollgruber, ministro de Aŭstrujo en Parizo; S-ro Alberic Jofrè kaj S-ro Alseika, respektive por la kataluna kaj litova registaroj; S-ro Ferasson, prezidanto de Komerca Ĉambro en Parizo ktp.

En sia malferma parolado, vicministro M. Jullien i.a. asertis: “[...] *Se estas vere, ke la lingvo, kiel montris Ezopo, estas samtempe la plej bona kaj la plej malbona el la aĵoj; se estas vere, ke la paroladoj de la homoj ne ĉiam kontribuas al la pacigo de iliaj kvereloj, oni devas konfesi ke Esperanto evitas la originan pekon de la naciaj lingvoj. Ĝi enhavas neniun memor-aĵon, neniun bedaŭron, neniun amarecon, nek la plej malgravan fermenton de vana orgojlo aŭ de malamo. Ĝi estas, nature, necese, faktoro de interkompreniĝo, de interkonsento, de estimo, de unuiĝo, de homa frateco [...].* Konkludis entuziasmige la solenan inaŭguron la “Himno por la Festo de la Kunvenintaj Nacioj” kaj la Finalo de la Naŭa Simfonio de Beethoven, kantitaj Esperante de solistoj kaj ĥoroj de la Nacia Opero de Parizo.

Kio plia interesa estas sur *mi*? Ho jes, belega glumarko! Stile moderna, kun grandeco de 57x37 mm, sur ĝi aperas la turo *Eiffel* kaj pariza panoramo. Kompreneble ne povas manki la Esperantoflago plus titolo kaj datoj de la okazaĵo. Sube, dekstre, legeblas la subskribo de la desegnisto: Joël Thézard. Kiu li estis?

Joël Elie Thézard, n. la 23^{an} de februaro 1884 kaj m. la 27^{an} de junio 1957, estis

akvarelisto, grafikisto, karikaturisto kaj ankaŭ romanverkisto. Post abiturienteco, li fariĝis profesoro pri desegno kaj ekinstruis en Niort (regiono en Nova Akvitanio) kaj poste ankaŭ en aliaj francaj urboj. Li publikigis ĉ.




kvardekon da libroj pri instruado de tiu arto. J. Thézard multe vojaĝis, de Maroko ĝis Palestino, ĝis la polusaj glacioj. Post ĉiu vojaĝo li publikigis volumojn da notoj, ornamitaj per rilataj ilustraĵoj kaj skizoj. Li estis fakte tre fekunda artisto: interalie li plibeligis kaj riĉigis la Bibliion per ĉ. 500 bildoj, el kiuj dekdu admireblas en parto de la Zamenhofa biblio-teksto (*La bela historio de Jozefo*). Probable Joël Thézard lernis Esperanton inter la jaroj 1931-1932, tio parte deduktita de iu anonco, aperinta en la *Franca Esperantisto*, 1937, rilata al lia akiro de atesto pri kapableco ĉe la E-grupo de Niort: tiam unu el liaj ekzamenintoj estis Gaston Waringhien. Alia sciigo, publikigita du jarojn antaŭe en *Esperanto Triumfonta*, informas, ke s-ro Thézard estas la prezidanto de la Nortia Esperanto-



Glumarka bildo
farita de J. Thézard

grupo kaj ke en la loka ĵurnalo *Travel* aperas ‘*simpla gramatika E-kurso kaj vojaĝnotoj kun liaj desegnoj kaj akvareloj*’.

Ankaŭ en Esperanto li verkis librojn, kies tekstoj estas akompanataj de liaj desegnaĵoj: *Nordnordaj fabeloj*, *La predikoj de Sankta Petro*, *La desegno per desegno*, *Polusaj glacioj sub noktomeza suno* k.a.



Desegnaĵo de la ŝipego Foucauld (Fuko)
per kiu li vojaĝis al Norda Poluso.

Do ĉio ĉi atestas, ke li estis tre agema esperantisto.

Ĉu nun vi opinias, ke tiel ĉi finiĝas la rakonto pri historio de *simpla* koverto? Ankoraŭ iom da pacienco, ĉar sur *mi* kuŝas alia gravaĵo: la **poŝtmarko!** Kial ĝi estas grava? Temas pri poŝtmarko franca eldonita en 1936, sur kiu aperas la bildo de Jean Jaurès, n. en 1859 - kiel nia Zamenhof - kaj m. en 1914.

Franco, li estis elstara figuro en politika kampo kaj valora historiisto. En 1885 li iĝis respublikana deputito, sed iom post iom li ekinteresiĝis pri socialaj problemoj, ĉefe pri la situacio de la laborista klaso, ekigante tiel sian batalon favore al sociaj leĝoj. En 1904 J. Jaurès fondis la ĵurnalon *L'Humanité* kaj komencas, la postan jaron, labori sine de la Franca Sekcio de la Laborista Internacio. Kontraŭmilitisto kaj pacisto, dum la 1907^a jaro, okaze de la 2^a



Internacio en Stutgarto, li proponis, kune kun alia franca socialisto, meti en la tagordon, ke Esperanto estu uzata en la oficialaj dokumentoj de la Internacia socialista estraro en Bruselo. Tiu propono estis rifuzita, ĉefe pro la akre kontraŭstara interveno de Paul Singer, germana socialdemokrato. Ĉio ĉi ekscitis la socialdemokratojn de la Esperanto-movado: kelkaj, el kiuj ankaŭ Edmond Privat, reagis proteste per publika letero, substrekante la kontraston inter la principa internaciismo de socialistoj kaj ties reala konduto.



En 1931, dek sep jarojn post la morto de J. Jaurès, aperas en *Sennaciulo* artikolo rilata al lia oratora kapableco, kvazaŭa gloriga himno al lia *nobla figuro*. Jen la enkonduka parto: *La 31^{an} de julio 1914, en la horoj de angoro, kiam la homaro en sinforĝesa frenezo ĵetis sin en la militegon, [...], Johano Ŝores estis fimortigita [per pistolpafo] de ŝovinisto [iu R. Villain]...*

Jean Jaurès deklaris, ke *Esperanto estas la latino de la demokratio*.



Interesa rakonteto, ĉu ne? Tutesperanta koverto! Sur ĝi aperas aŭtentikaj perletoj. Dubeto tamen min ronĝetas: ĉu la poŝtmarko estis alcele elektita aŭ temis pri nekonscia hazardo? Ĉiaokaze ne gravas: tiu simpla rektangula paperpeco havas gravan meriton, ĉar ĝi konvinkis min esploradi, pacience kaj persiste, ĝis kiam, el kunmetado kaj ordigado de kelkaj puzleroj, formiĝis fine pli-malpli klara bildo, eĉ se ne kompleta, pri tiu eta parto de nia pli ol centjara historio.

Dum traserĉado en diversaj revuoj aperis pluraj detaloj rilate al tiu grandioza evento, kiu plenigis je esperoj de postaj gloraj atingoj. Nia lingvo eniris en plurajn lernejojn de la lando, en sciencajn rondojn, en fervojajn kaj poŝtajn sektorojn, en medicinajn rondojn... Sed milito estis preskaŭ ĉeporde: kiel ŝtormo ĝi sturmis ĉie kaj ĉien kaj ankoraŭfoje detruis kion oni estis konstruinta, etpaŝe kaj peneg, post la unua mondmilito, nenigante flugilsvinge la persistan laboradon de niaj antaŭuloj.

Ankoraŭ io aldonendas: pri tiu konferenco raportadis ĉiutage plurdekoj da ĵurnaloj kaj ĉiuspecaj fakrevuoj, francaj kaj eksterlandaj, eĉ en Venezuelo aperis artikoloj pri tio, per vortoj ĉiam pozitivaj. Kompreneble ankaŭ

E-ĵurnaloj entuziasme prezentis tiun epokfaran aranĝon. Nur unu ne partoprenis en tiu *festado*: tion ĉi maldolĉe konstatis la nelacigeble laborema sekretario P. Petit. Jen lia komento: *Kompreneble, la gazeto de UEA "Esperanto" nenion skribis pri la Konferenco, antaŭe kaj poste. Tio, kio celas la disvastiĝon de esperanto en ĉiujn mediojn, prezentas ŝajne nenian intereson por la kabaluloj de Ĝenevo.*

Ĉu el inter vi estas iu bonvolulo, kiu pretus preni sur sin la taskon, malkaŝi la kialo(j)n de tiu aserto? Vere interesa estus tia enketo, ĉu ne? Mi atendas vian kunlaboron.

Fontoj: E-Muzeo Vieno: el Esperanto Triumfonta, Franca Esperantisto, Sennaciulo, Sennacieca revuo; Unuiĝo Franca por Esperanto/Biblioteko Hipolyte Sebert; Vikipedio.

GLUMARKOJ: PLI OL NUR MESAĜILOJ...

Albert BOON

Ne estus mondsdua novaĵo, anonci, ke glumarkoj unuavice havas informcelan funkcion.

Por skizisto-gravuristo ili tamen unuavice estas artefaktoj, kiuj tre ofte reflektas la artajn principojn kaj la stilon de la epoko en kiu ili estis kreitaj kaj, laste sed ne balaste, la propran artan vidpunkton de la artisto.

La glumarko, elektita por ĉi artikolo, laŭcele certe estas propagandilo por la internacia lingvo, sed samtempe ĝi estas delikata kaj alloga belaĵo pro la eksterordinaraj stilo kaj kompetenteco de la (nekonata) gravuristo.

Jen do karakteriza ekzemplo de la eleganta stilo el la komenco de la antaŭa jarcento, nomata "Nova Arto", aŭ franclingve "Art Nouveau", germanlingve "Jugendstil".

La glumarko, kun du nuancoj de verdec koloro, meze montras en ortanguleto (25 x 33 mm) jenan mesaĝon:

"**LERNU Esperanton** la sole **PRAKTIKAN** internacian LINGVON."

La glumarko mem havas jenajn mezurojn: 72 x 95 mm. Dors-flanke restis la originala gumo.





Laŭteme aperas stiligita figuro de unu el la plej belaj birdoj en la mondo: la paradizeo. Kvankam la artisto uzas nur du nuanc-ojn de la sama koloro, li sukcesas montri la belecon de la birdo nur dank' al lertplena ludado surbaze de elegantaj, barokaj linioj en la riĉega stilo de Nova Arto. Laŭ mi, jen eksterordinara


rezulto, kiu abunde subtenas la mesaĝon de ĉi juveleto.



EGIPTAJ GLM-OJ


Elda DOERFLER

Ju pli oni fosas, des pli oni trovas. Tuthazarde, serĉante en mia senfunda arkiv-puto, mi malkovris la ĉi-suban serion da glumarkoj, pri kiu nenia memorspuro restis en mia cerbo. Temas pri egiptaj glumarkoj, kiuj verdire ne estis tiom amase eldonitaj en tiu lando. Sur ĝia rando, stampite kaj manskribe, legeblas la jena informo: Eldonis Tados Migalli, *Fayum* (forstrekitaj), Kairo, poŝtkesto 1914. Post perlupea kontrolo, evidentiĝas,



ke tiuj estas simple bluainke faritaj per stampilo. Sur la glm-oj dato ne videblas, super la vorto *Propaganda* eble estas alia skribo, sed nedeĉifrebla. Ĉe la tria glm-o, baze de la arkoforma *Esperanto*, rekoneblas la vortoj PACO kaj AMO. La bildoj, laŭvice de maldekstre, prezentas la usonan

Liberecstatuon, la egiptian Sfinkson, ĉinan palacon, la *Taj-Mahala*-n Maŭ-



zoleon. Je ĉi punkto la malhelo pliheliĝas, ĉar en la ujo pri landaj glumarkoj, kuŝas aliaj samspecaj, sendentaj kaj dentumitaj, kies bildoj kaj literoj estas pli malkonfuzaj. Sur tiuj aperas du datoj: 1925-1935, super la vorto *Propaganda* estas skribite: *Mondvojaĝo Edmund Zscheile*.

Finfine la esplorklaboro povas starti!

En tiuj jaroj multaj E-propagandistoj travojaĝas preskaŭ la tutan mondon, kelkaj eĉ piedire, el kiuj menciindas ĝuste E. Zscheile, Joseph Scherer, Julio Baghy k.a. S-ro Zscheile ekiras de Lejpsigo (aŭ Lipsiko), Germanio, je la 1^a de aŭg. 1923 kaj post tri jaroj (jan. 1927) li estas en Ĉi-

nio!!! Supozeble en 1931 li renkontiĝas en Egiptio kun Tadros Migalli (aŭ Megalli), kiu tiuokaze farigas la propagandajn glm-ojn (el *Esperanto Triumfonta-1931*). Nur iomete ni konatiĝu kun li. Li estis egipta samideano, naskita en 1912, lerninta E-on en 1928 per koresponda kurso. Jam en 1932 li fondas la unuan E-grupon en Fajum. Ekde tiam sian tutan tempon li dediĉas al nia Lingvo, tiel ke liaj samurbanoj nomas lin *S-ro Esperanto*.

En 1940 li translokiĝas al Kairo: tie li restarigas la



Joseph Scherer
kaj Tadros Migalli

Egiptan E-Asocion. Li kunlaboras ankaŭ por krei E-klubon por militkaptitoj. En Kairo li akiras la diplomon de Doktoro pri psikologio. Instigita de la du mondvojaĝantoj Scherer kaj Zscheile, li komencas migradi tra Eŭropo, kie entute li vizitas 14 landojn. Kursogvidanto, fotografisto, ĝisosta propagandisto, li faras pli ol 2.500 prelegojn kun prezento de koloraj lumbildoj kaj 8mm-aj filmoj. Krom Esperanto, li kapablas paroli angle, france, germane, arabe kaj itale! (el *Usona Bulteno-1962*).



Eksterordinara kaj fervora esperantista pioniro!

ESPERANTO TRA CENZURO (2^a PARTO)

James REZENDE PITON

En la daŭrigo de nia superrigardo pri poŝta cenzuro kaj Esperanto (v. unuan parton "La Verda Lupeo" 187, Aŭg. 2021), ni alvenas al la fino de la Unua Mondmilito. Oni povus imagi, ke pro la militofino la poŝta cenzuro, tiel intensa inter 1914 kaj 1918, same finiĝis. Tamen ne ke la informfluo plu estis delikata temo, kiu koncernis ŝtatan sekurecon, almenaŭ en iuj partoj de Eŭropo.


Malvenkintoj devis trude pagi grandajn monkompensojn, la mapo de meza Eŭropo havis siajn limojn draste redeseĝnitaj, iuj regionoj estis ŝovitaj al aliaj manoj, aliaj fariĝis memstaraj landoj.

Ĉefe en tiuj novaj sendependaj landoj oni plu havis la poŝtan kontrolon. La fakto, ke la sendinto uzis Esperanton ne ŝajnis malhelpaĵo.

Jen sekve, en unu sola E-letero el 1919, du landoj kunligitaj de preskaŭ samtempa sendependeco - Finnlando, kiu deklaris en Decembro 1917 la estingiĝon de sia statuso kiel Grandprinclando de Rusio, kaj Ĉeĥoslovakio, kiu ekde Oktobro 1918 kunigis la teritoriojn de Bohemio, Moravio, Slovakio kaj Karpata Rutenio.




Esperanto-letero sendita el Humppila (Finnlando) al Kladno (Ĉeĥoslovakio), la 4^{an} de Oktobro 1919.



Dorso, renversita:
Kontrolita/Militcenzuro


Alia ekzemplo estas la sekva bildkarto de Zagrebo, sendita de esperantisto la 15^{an} de Decembro 1919 al Svislando. Sur la bildflanko, krajone nuligita, poŝtmarko eldonita de *Država Slovenaca, Hrvata i Srba (SHS)*, la unua

versio de Jugoslavio. Tiu ŝtato daŭris nur unu monaton (inter la 29^a de Oktobro kaj la 1^a de Decembro 1918) sed produktis siajn poŝtmarkojn.



Tiam ĝi aliĝis al la reĝlando de la serboj kaj la montrata bildkarto estis uzita en tiu nova ŝtato. Sur la dorso estas krajona skribaĵo 7.II.'20, supozeble

la dato kiam ĝi atingis la ricevinton. Oni duonvidas violan cenzurstampon en la serba lingvo: “Kontrolita de la Militista Cenzuro”.



Sur la karto, poŝtmarko de la ŝtato de la Slovenoj, Kroatoj kaj Serboj (SHS)

Kaj en 1922 oni ankoraŭ trovas cenzuron en Ĉeĥoslovakio!




Esperanto-karto cenzurita kaj sendita el Reichenberg (Ĉeĥoslovakio)
al Szombathely (Hungario), la 30^{an} de Junio 1922.

Laŭlonge de la sekvaj dek kvin jaroj, oni trovas la revivigon de poŝta cenzuro en regionaj okazoj, ekzemple pro ŝtatrenverso (aŭ provoj), aŭ eĉ kiel kamufilita cenzuro. En la jaro 1935 reĝo Georgo la 2-a nomumis Ioannis Metaxas kiel ministron de milito kaj en aprilo de 1936 kiel ĉefministron. Kun la reĝa subteno, Metaxas komencis la 4^{an} de aŭgusto de la sama jaro diktaturon de faŝisma modelo. En tiu periodo, pro iu pretenda agado kontraŭ kaŝa eksportado de monrimedoj, fiska instanco (UPS) komencis kontroli la enhavon de leteroj. Tamen la sama strukturo estis uzita por kontroli politikajn informojn.

Jen ekzemplo en bildkarto uzita en Esperanto en 1937, cetere skribita de fama esperantisto, kuracisto Anakreon Stamatiadis (1868-1934), al alia famulo, la franca Prezidanto de la Akademio, Maurice Rollet de l'Isle (1859-1943):



Greka poŝtkarto sendita en Esperanto la 5^{an} de Junio 1937, el Ateno al Parizo. Stampo de Υπηρεσία Προστασίας Συναλλάγματος (ΥΠΣ), la Servo de Kurzo-Protektado, kiu estis uzita por kolekti politikajn informojn.



Oni scias pri la uzo de Esperanto ankaŭ dum la Hispana Enlanda Milito, en kiu partoprenis inter 1936 kaj 1938 ĉ. 60 mil homoj el pli ol 50 landoj (el kiuj ĉ. 10 mil mortis en Hispanio dum tiu periodo). En Esperanto regule aperis materialo de la hispana sindikato CNT/FAI.

Pri la Hungara tutaĵo, aperanta en la antaŭa paĝo, sciindas, ke temas pri tutaĵo je 10 filler, skribita en Esperanto kaj sendita en 1937 de Buda-peŝto al Barcelono, kun aldonita poŝtmarko je 10 filler por kompletigi la poreŭropan afrankon. Stampo: REPÚBLICA ESPAÑOLA - CENSURA. En tiu granda serio da tutaĵoj, la teksto, kiu klarigas la fotojn estas en la hungara, la franca kaj esperanto (ĉi tiun la sendinto substrekis).

Se jam dum la Hispana Enlanda Milito (1936-1939) la poŝta cenzuro revenis kun granda forto, en la Dua Mondmilito ĝi atingis sian kulminon. Tion kaj tre malfruan okazon de poŝta cenzuro en Eŭropo en la 1980-aj jaroj ni prezentos en venonta numero de *La Verda Lupeo*.

HONORE AL NIA MAJSTRO JE LIA 105-A MORTODATREVENO



28-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
1936



Stampo pri la Viena UK.
Emisidato: 8. aug. 1936

Portreto de Lazaro Ludoviko Zamenhof, donaco de la Nederlandaj E-grupoj;
Urno kun tero el lia tombo en Varsovio, donaco de Lidja Zamenhof;
La unua flago de Esperanto - Kongreso Boulogne 1905, kun la subskribo de Zamenhof, donaco de ges-oj Sergeant.

EL SENTA: STAMPO KAJ GLUMARKO Elda DOERFLER



31. VERDAJ AMIKAJ TAGOJ



Dr SZELI ISTVÁN

11.09.1921. - 25.02.2012.

DESEGNINTO S BELEC ANIKÓ

Ankaŭ ĉi-jare atingas min novaĵo el Senta, danke al nia samligano Imre Belec. Okazis en lia urbo la kutima renkontiĝo VERDAJ AMIKAJ TAGOJ, je sia 31^a fojo. Krom la poŝtkarto, kun bildo de d-ro Szeli István desegnita de Aniko Belec, kaj stampo pri la evento, aperis ankaŭ glumarko. Meritas ĉi esperantaĵoj nian ioman atenton, ĉar ili honoras du gravajn personojn.

En la E-societo de Senta oni memorfestis la 100-jariĝon de la naskiĝo de **I. Szeli**, hungara literaturhistoriisto, kritikisto kaj akademiano. Li estis instruisto kaj direktoro en diversaj lernejoj kaj poste en universitatoj, ĝis akiro de la titolo de Doktoro pri Literatura scienco. Li interesiĝis pri esperanto, pri kiu li diris ke "ĝi por ni ĉiuj, iam, belsona kulturlingvo fariĝos." Plie, li klarigis, ke tiu ankoraŭ eble neorganika kreaĵo

de la homa cerbo post iom da tempo iĝos *malpeza, inteligenta, fleksebla*, ke naskiĝos *la lingvo de Homo, alportante pacon al la kverelantaj nacioj kaj liberigos ilin de inter malutilaj limoj*. I. Szeli skribis multajn librojn, pri kulturo, literaturo, etiko k.a. Inter tiuj ankaŭ *Memorlibro* (2001), en kiu

li priskribas la vivon de Cezaro (Géza József) Bárczy. C. Bárczy (aŭ Bárczi) naskita en Sombor, iam en Hungario kaj nun en Serbio (1894), estis unu el la plej elstaraj hungaraj lingvistoj de la 20^a jc, membro de la Hungara Scienca Akademio, instruisto kaj edukisto. Li renkontis Esperanton



fruaĝe, tiom ke jam en 1906 li fondis E-klubon. Ekde 1941 li iĝis universitata docento ĉe la Hungar- kaj Finn-ugra Lingvista Katedro. Estante ĉefprofesoro ĉe la departemento pri Hungara Lingvistiko, en 1966 li helpis kaj subtenis la enkondukon de Esperanto-instruado fare de István

Szerdahelyi en la Universitato Eötvös Loránd. Multe li verkis en kaj tradukis al Esperanto. Danke al la 31. Verda Amikaj Tagoj, Senta, ni konatiĝis kun du interesaj personoj, kiuj havis striktan rilaton kun nia Esperanto.

EL LJUBLJANO: IPM

En la Magistrata domo, sidejo de la Urba komunumo Ljubljano, okazis la 3^{an} de decembro 1921 la fondkunveno de unu el la plej malnovaj Esperanto-societoj en Slovenio, kies fiera heredanto estas E-Societo Ljubljana. Por inde festi tiun gravan atingon, nome la centjaran jubileon de ESL, estis eldonitaj du diversnominaj *individuaj* poŝtmarkoj (IPM), sur kiuj aperas



la emblemo de la Societo kaj la jardatoj de la 100-jariĝo: la emisia tago estis je la 23^a de septembro 2021.

La mezuroj de la pm-oj: 42 x 35 mm; de la bildo 32 x 25 mm; de la rando 5 mm. Ĉiu folio konsistas el 20 pm-oj.

La poŝtmarko A estas uzebla inter-



ne de Slovenio, dum tiu kun litero C bezonatas por sendo de korespondaĵoj el Slovenio al eŭropaj landoj.

Pm-oj A kaj C kostas respektive 1,41 kaj 2,09 eŭrojn. Entute estis emisiitaj po 200 ekzempleroj. La emblemo estis desegnita de Mateja Vrbinc kaj la poŝtmarko estis kunmetita de Ostoj Kristan per la programo de *Pošta Slovenije*. Kiuj deziras aĉeti ĉi slovenajn pm-ojn, povas skribi rekte al s-ro Ostoj Kristan, ĉe kristan.ostoj[at]-2.si *Dankon al li pro la informoj!*

ESPERANTO-(LANCET)FLAGETO EL LA INTERMILITA EPOKO

Albert BOON

Jen manfarita flageto el silko/sateno. La mezuroj estas proksimume 280 mm x 180 mm. Ĝi surhavas ambaŭflanke poŝtstampojn de Esperanto-koncilioj el la 20aj kaj 30aj jaroj. Ĝi enhavas krome krajonajn subskribojn de partoprenintoj, el kiu la plej fama estas Felikso Zamenhof, frato de Ludoviko. Kelkaj aliaj (vidu fine de ĉi artikolo): Julius Glück, Jakob Schmid kaj Teo Jung.

La flageto datiĝas je 1924 kaj la aktuala aŭkcia baza prezo estis 590 eŭroj!

Jen listo de la stampoj sur unu el ambaŭ flankoj. La valoro de tiu objekto estas la granda parto de Esperantaj eventoj, sendube science esplorindaj kaj esplorendaj. Bedaŭrinde kelkaj stampoj estas iome falditaj.



Klarigo de la stampoj

1923-15^a UK Nurnbergo



1924-16^a UK Vieno




1925-7^a UK Ĝenevo



1926-18^a UK Edinburgo



1927-19^a UK Danzigo




1928-20^a UK Antverpeno



1930-22^a UK Oksfordo1932-24^a UK Parizo1938-30^a UK Londono1927(?) - Varsovio
(ne-identigebla)1937 - Parizo
Eo en moderna vivo1939-31^a UK Svisio
Automobil postbureau

Personoj kiuj postlasis sian legeblan subskribon.



Julius Glück; Jakob Glück; Teo Jung; Ravestein Jr.



Felikso Zamenhof